La NASKa Fasko

Almanako de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

2024

Junio 30 - Julio 6

Enhavo

La Mirinda Cerbo	1
Venas Proverbo el Popola la Cerbo	2
Pri Miaj Katoj	4
Kvar Limerikoj kaj Unu Hajko	5
La Koboldoj	6
Mastro de Pupoj	7
Kiel Mi Fariĝis Esperantisto	8
Kiel Muziko Similas al Esperanto	9
Mirinda Mondo	10
Priskribeto Pri Eta Parto de la Taksonomio de Substantivoj en Esperanto	11
Dankon, Desegnistoj!	13
Esperantaj Sorĉoj en Angla Sonlibro	16
La konkerado de kadem bevünetik volapüka	17
Afantazio	18
Pri *Iŝtar*: 1999 kaj la sekvo	19
Baxter Parolas!	22
La Bienulino	23
Pri Lingvodenaskuleco	24
Griza Eminenco	26
ABC-listo de NASK 2024	27

La Mirinda Cerbo

de Vinĉjo ALLISON

La cerbo vere estas tre mirinda korpoparto
Ĝi regas ĉion en la viv', kun tristo aŭ bonfarto

Per ĝi ni povas movi ĉiun fingron kaj la manon
Por fari multajn agojn kiel ludi la pianon

Kapablo scii kiel uzi aŭton estas grava
Distingi ĉu la lumo estas verda? Ruĝa? Flava?



Profunde en la cerbo: nomoj de la amrilatoj
Kaj ankaŭ telefonnumeroj, kaj la hejmaj stratoj

Sed malgraŭ ĉio ĉi, ĝi tamen estas malperfekta
La cerbo en la kapo estas ja ne sendifekta

Honeste kion fari? Trovu do alternativon!
Konfesu - foje, ni forgesos la akuzativon!

Venas Proverbo el Popola la Cerbo

de Brandon SOWERS

Ĉu iam vi *metis vian nazon en fremdan vazon*? Ĉu iam vi *spertis tuberon en la afero*? Ĉu vi konsentus, ke *ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta*?

Mi citas nur 3 el la 2,630 proverboj[1] kolektitaj en la "Proverbaro Esperanta". Oni ankaŭ foje nomas ĝin la "Proverbaro Zamenhofa" aŭ la "Proverbaro de Zamenhof", kvankam tio eble samtempe pravas kaj malpravas. Malpravas, ĉar Ludoviko Zamenhof ne estis la inventinto de la ideoj en la proverboj. Tio estas, ke li ne kreis ilin el nenio. Ĉiu proverbo jam ekzistis en aliaj lingvoj, kaj estis uzata antaŭ ol aperis la Unua Libro[2].

Pravas, tamen, en pluraj sencoj: unue, ĉar kompilis la proverbojn Zamenhof, kvankam ĉi-kuntekste temas pri "M.F." Zamenhof, tio estas, la patro de nia kara L.L.Z. Marko Zamenhof kompilis "frazeologion" en kvar lingvoj (la rusa, la pola, la germana, kaj la franca), kiu servis kiel la bazo por la Esperanta Proverbaro de Ludoviko. Plue, ni tamen ne forgesu, ke "oni" devis traduki tiujn konceptojn al Esperanto, kaj ĝuste Ludoviko servis kiel tiu "oni".

La rezulto de lia laboro estas trezoro utiligebla de ni ĉiuj, kvankam multe maltro konata. La proverboj, kiujn Zamenhof proponas, estas plenaj je sprito, kaj sufiĉe bone ilustras la poetikon de nia lingvo. Mi defias al vi diri la proverbon *tute libera, kiel birdo aera*, sen rideti iomete pro la bela poezieco en ĝi.

Sed la proverboj valoras ne nur por alproprigi senton de la verda poetiko. Ili ankaŭ povas spici vian konversacion en Esperanto, aŭ dialogon en viaj skribaĵoj. La uzado de la proverboj kreas la senton de "popola poezio" aŭ "komuna saĝo" kiu ekzistas en la naciaj lingvoj. Ĉu via malamiko ofte

flatas nesincere? *Mielo sur lango, kaj glacio en koro.* Ĉu amiko via baldaŭ kreos por si multajn problemojn nebezonatajn? *En abelujon ne blovu.* Ĉu la laborĉefo ferias la 4an de Julio, sed diris, ke vi kaj viaj kolegoj tamen devas veni al la oficejo? Nu, kara, *kiam kato promenas, la musoj festenas.*


Proverbaro Esperanta

Frazeologio rusa-pola-franca-germana

M. F. ZAMENHOF

L. L. ZAMENHOF

PARIS
LIBRAIRIE HACHETTE ET Cie

1910

Vi ankaŭ povas uzi la proverbaron por solidigi vian koncepton pri vorto malfacila. Ekzemple, se vi ne ĉiam certas kiam uzi la vorton "ĝusta"[3], eble helpos vin memori, ke vi ĉiam volas *havi la kapon sur la ĝusta loko.*

Vi ankaŭ povas uzi proverbojn kiel inspirilojn por verkado. Iam mi defiis al mi verki po rakonton tage dum tuta monato, ĉiam inspirita de hazarda proverbo. Tio sufiĉe bone funkciis – la proverboj ĉiam donis al mi sufiĉe interesan bildon, ke mi povis ekverki tuj kaj post horo havis pli-malpli finitan tekston.

Ĉu vi volas mem komenci uzi la proverbaron? Mi kuraĝigas al vi, almenaŭ rigardu, kaj vidu, kio plaĉas al vi. Vi povos ĝin trovi ĉe proverbaro.net, kie vi povos serĉi per specifaj vortoj, per konceptoj, aŭ per gramatikaj kategorioj kiel prepozicioj kaj afiksoj. Estas tre bona maniero plifortigi vian lingvouzon; kiel Zamĉjo diris, "konado de proverboj estas necesa por perfekta konado de la lingvo." Tiam malpli ofte venos *fino al via latino*!

[1]La defino de 'proverbo' laŭ PIV: "Popola maksimo, enhavanta konsilon aŭ konstaton pri ia ĝenerala, psikologia aŭ morala veraĵo". Aŭ, pli koncize, de la Proverbaro: proverbo estas sperto, proverbo estas averto.

[2]Kun la verŝajna escepto: "ĝi estas por mi volapukaĵo".

[3]*Precize konforma al regulo, leĝo, destiniteco*

Pri Miaj Katoj

de Phillip DRISCOLL

Mi ne estas verkisto, sed mi rakontos al vi pri miaj katoj.

Kiam mi estis juna, mi ne multe ŝatis katojn. Mi ofte forĉasis ilin aŭ ĵetis ŝtonojn al ili.

Sed kiam mia koramikino havis katojn, mi lernis kiel specialaj ili estas. Mi nun havas du nigrajn katojn. Ambaŭ el ili havas dek du jarojn. Mi trovis la unuan kiam ĝi havis nur ses monatojn. Ĝi loĝis sub arbusto apud la telefon-oficejo ĉe la angulo de mia strato. Mipromenis laŭ la strato je noktomezo, kaj la katido kuris al mi. Do mi portis ĝin al mia hejmo.

La alia kato venis de mia kunlaboranto. Lia filino kunportis la katidon hejmen, sed la filino translokiĝis al Kalifornio post unu jaro, kaj ŝi forlasis la katon. La familio ne volis havi katon, kaj tri jarojn poste, mia kunlaboranto donis ŝin al mi.

Miaj katoj tre feliĉigas min.



Kvar Limerikoj Kaj Unu Hajko

de Mike "Mamuto" LOWDEN

Donacoj Gravoj
Mi ŝikajn aferojn bezonas
Do bone, la muzojn mi konas
La Kultur' estus pli
helpi ĝin volas mi
Do jen, limerikojn mi donas

La Kompatinda Reĝo
En urbo tre granda kaj bela
La Reĝo ne estis amebla
Li serĉis reĝinon
Ĉar li volis filon
Finvenkulin' ne estis trovebla

Provo
Mi scivolas, ĉu
Hajkon mi povas skribi
Mi ne certas

Denove
La lingvo mi regas, mi kredas
Majstreco mi vere posedas
La Lingvo Facila
Kaj ankaŭ utila
...
Nu, foje mi fuŝas, mi cedas

La Fundamento
Legado estas bonega
Mi ja estas ulo simplega
Zamĉjon mi provas
Ĝis nun mi ne povas
Kia frazo longega!



La Koboldoj

de Luther "Lutero" THOMPSON

Ni venkis la kolboldojn kaj prenis ties monon. Ni forkuris al la flughaveno antaŭ ol la aliaj koboldoj trovis nin. Hundo ĉe la flughaveno flaris la sangon de la koboldoj, kaj ni estis kaptitaj. La gardistoj vokis la koboldojn por demandi, kio okazis? Mi subite tranĉis la gardiston dum la voko. La ceteraj gardistoj mortpafis min. Unu el miaj uloj havis specialan permisilon por mortigi koboldojn. La gardistoj liberigis miajn ulojn, sed enterigis min en nemarkitan tombon. La koboldoj trovis miajn ulojn kiam ili eliris la flughavenon. Miaj uloj bone batalis, sed ili ĉiuj mortis.

Mastro De Pupoj

"Master Of Puppets" de Metallica tradukis Luther "Lutero" THOMPSON

Fin' de l' ekbonaĵ', enpeciĝas for
Mi donacas memdetruon
Vejnoj kun timo, suĉas mallumon
Vian morton construadas

[Rekantaĵo]
Gustu min, vidu
Pli vi bezonas
Dediĉita por
Mi mortigas vin

[Antaŭ-refreno]
Rampu rapide
Obeu mastron
Via viv' brulas
Obeu

[Refreno]
Mastron, mastron
Mastro de pupoj tiras kordojn
Tordas menson kaj rompas revojn
Pro mi, vi ja ne povas vidi
Nur voku min, mi aŭdos krion
Mastro, mastro
Nur voku min, mi aŭdos krion
Mastro, mastro

Nadlo allogas, ne vi perfidu
Vivo de morto klariĝas
Reĝo de dolor', rita malĝojo
Mantenmanĝu sur spegulo
[Rekantaĵo]
[Antaŭ-refreno]
[Refreno]

Mastro, mastro, mastro, mastro

Mastro, mastro
Kie la revoj, mi ĉasis
Mastro, mastro
Promesis mensogojn
Rido, rido
Mi aŭdas, vidas nur ridon
Al miaj krioj
Helpu

Inferno estas natura loĝej'
Nur rimo sen la kialo
Labrinto sen fin', drivu ĝis morto
Nun via viv' ne estas ŝika

Mi ja okupos
Mi helpos morton
Mi fluos tra vi
Nun mi regas vin

[Antaŭ-refreno]
[Refreno]

Kiel Mi Fariĝis Esperantisto

de Thomas RUSCH

Kiam mi komencis miajn studojn en la universitato, mi sciis jam, ke mi volas esti instruisto de la germana lingvo. Mi havis ankaŭ aliajn lingvokursojn. Mi ŝatis lerni novajn vortojn kaj kompari ilian gramatikon.

Mi ne scias kiam mi eksciis pri Esperanto. Eble mi legis artikolon en revuo aŭ mi aŭdis ion en la radio. Do, la ideo tre plaĉis al mi: simpla helplingvo por ke ĉiuj povu komuniki unu kun la alia. Mi trovis nur tri malnovajn librojn pri Esperanto en la universitata biblioteko.

Mi ludis kun la lingvo, sed mi ne faris pli. Preskaŭ jardekon poste mi ĉeestis la Usonan Kongreson de Esperanto en Ĉikago, ĉar ĝi ne estis tro for. Tie iu demandis min, – Kiam vi komencis paroli Esperanton? – Ĝuste nun, mi respondis!

Pasis nun pli ol tridek jaroj ekde tiam, kiam mi estis en Ĉikago. Mi lernas Esperanton tre malrapide, sed mi ne rezignas.

Antaŭ du jaroj mi ŝanĝis mian rangon de *eterna komencanto* al *eterna progresanto*.

Mi esperas vidi vin la venontan jaron!

Kiel Muziko Similas al Esperanto

de Alaine "Alejna" WARFIELD

Kiam homoj demandas min "kio estas la utileco de Esperanto", mi parolas pri muziko. Aparte, pri tiu aspekto de muziko per kiu oni povas skribi, legi, kanti, komponi kaj ludi ĝin: la muziknotacio.

Kiam mi studis klasikan violonon, mi tre ŝatis la popularan Broadway-muzikalon "Ĵosefo kaj la Mirinde Bunta Sonĝmantelo." Mia klasika instruistino neniam aŭdis tiun kanton, kiun mi ŝatis; tamen, legante la partituron, ŝi bone ludis ĝin per sia violono. Mi miris, ke la kanto estis tute ĝusta - la melodio, la takto, la emocioj.

Mi ekkomprenis la povon de muziknotacio kiel mondlingvo. Ĉiuj en la mondo, kiuj kapablas legi muzikon, povus preni partituron kaj reprodukti la saman komponaĵon!

Muziknotacio similas al Esperanto. Ĝi estas nenies denaska lingvo. Ĝi estas tutmonda kaj de ĉiuj. Nur kelkaj vortoj havas italdevenan originon, sed ĝenerale ĝi estas lingvo memstara.

Kelkaj instrumentoj povas havi sian proprajn terminojn aŭ skalojn, sed per muziko, homoj de ĉiuj landoj de la mondo povas facile interkomunikiĝi por kompreni unu la alian.

Tio estas la potenco de Muziko.

Tio estas la potenco de Esperanto.

Mirinda Mondo

de Carrie "Keri" JONES

Ni loĝas en mirinda mondo. Estas infanoj kiuj havas tri okulojn. Hundoj ne ŝatas infanojn kiu havas tri okulojn. Elefantoj estas malgrandaj bestoj. Anasoj estas grandegaj bestoj. Anasoj ofte timas min. Multaj homoj havas specialajn povojn. Mi povas flugi. Ofte mi flugas al aliaj planedoj. Ho, mi fumis tro da kanabo denove!

Plukis folion
de arbusto angula.
Maĉ'. Estas plasto.
de Hanso BECKLIN



Membroj de la homaro,
Estu felicaj.
La hieraŭon, vi ne povas ŝangi, kaj la
Estonteco venigas novajn eblojn.
Rimarku la belan hodiaŭon.
Banu vin en la varma amo de vivo.
Anticipu la plej bonan je aliaj.
Brilega kaj speciala estas vi, kaj
Aranĝos la universo vian futuron.
de Chuck "Karleto" MAYS

Priskribeto Pri Eta Parto de la Taksonomio de Substantivoj en Esperanto

de Nicholas "Nikolao" LeBlanc

Kiam oni pli profundiĝas en la lernadon de Esperanto, oni komencas rimarki nuancojn de la lingvo. Kvankam mi ne estas fakulo pri Esperanta lingvistiko, jen kelkaj el miaj observoj pri nuancoj rilate al substantivoj.

Kiel oni jam scias, ĉiu substantivo en Esperanto finiĝas per *-o*, ekzemple *kat-o*, *hund-o*, *hom-o*, ktp. Tiumaniere, la rolo de la vorto (kiel substantivo) estas tre facile determinebla. Sed pro tio simpleco eblas, ke oni ne rimarkus, ke ekzistas pluraj semantikaj klasoj de substantivoj. Jen mallongega priskribo de 3 el tiuj klasoj, ne ordigitaj per iu ajn apartaĵo aŭ trajto, kiuj temas pri specoj de homoj.

La unua klaso konsistas el la "simplaj" substantivoj, kiel *kato* kaj *hundo*. Semantike, la radiko rilatas al iu (ofte fizika) objekto aŭ afero en la mondo. Mi dirus, ke en la prototipaj okazoj, oni povas observi tiujn per la propraj okuloj. Tiu ĉi klaso inkluzivas vortojn rilatajn al variaj specoj de homo: *viro*, *frato*, *avo*, *kuzo*, ktp.

Ankaŭ dua klaso konsistas el homoj, sed pli ofte la homoj estas karakterizataj per sia (profesia) agado, ekzemple, *filozofo*, *geologo*, *biologo*. La respondaj fakoj por tiuj estas *filozofio*, *geologio*, kaj *biologio*. Laŭ unu analizo, oni povus diri, ke la radiko estas iom modifita, kaj la aldona *-i-* ne traktiĝus kiel sufikso: *biolog-* devenas de *biologi-* antaŭ la aldono de la "vera" sufikso *-o*. Sed pro la "atomeco" de Esperantaj vortpartoj, preferindus esti la analizo de PMEG, kiu rekonas *-i-* kiel neoficialan sufikson. Do oni preferinde analizu *filozofio* kiel

filozof-i-o, ne kiel *filozofi-o*. Tiuokaze, la kogna skemo estas la jena: [radiko signifanta homon] + [*-i-* “fako”] + [*-o* (substantivo)] = “la fako de la homo”.

Ankaŭ tria klaso konsistas el homoj, ekzemple *franco*, *ruso*, kaj *japano*. Kontraste kun la dua klaso, tiuj homoj estas karakterizataj aŭ per ilia civitaneco, aŭ per ilia etno (la diferenco ne estas ĉiam klara), kaj ankaŭ ili havas respondajn vortformojn kun *-i-*: *Francio*, *Rusio*, *Japanio*. Sed tie ĉi la signifo de la sufikso *-i-* estas tute alia, ĉar ĝi indikas la landon de tiuj homoj. Tiusence oni rajtas diri, ke la sufikso *-i-* estas dusenca homonimo. Do la semantika skemo de tiaj vortfamilioj inkluzivas la jenan: [radiko signifanta homon] + [*-i-* “lando”] + [*-o* (substantivo)] = “la lando de la homo”. Kompreneble, mi rimarku, ke tiu ĉi -i- estas nefundamenta.

Kompreneble, Esperanto enhavas pli da substantivaj klasoj ol tiuj tri, kaj la supera analizo estas tute nekompleta.



fotis Carrie “Keri” Jones

Dankon, Desegnistoj!

de Alekso MILLER

Plaĉa parto de NASK ĉiujare estas foliumi la dokumentojn pri Esperanto en la akceptejo de nia dormejo. Estas speciala afero fizike tuŝi pinglojn, librojn, kaj bulteno-ekzemplerojn kiam aferoj nun ekzistas ĉefe en la reto. Ni memoru, ke iuj devas krei kaj alporti tiujn interesaĵojn antaŭ ol ni povas ĝui ilin.

Elioto KILLIAN ĉi-somere denove desegnis, mendis, kaj donacis grandan stakon de scienc- fikciaj poŝtkartoj pri Esperanto por nia evento. Mi aĉetis poŝtmarkojn por sendi kelkajn al miaj amikoj. Mi aĉetis kromajn do trovu min kaj petu kaj mi donos al ĉiu persono po unu senpagan poŝtmarkon ĉi-semajne.

Mi ankaŭ eksciis ĉi-jare, ke Phillip DRISCOLL havas sian propran malnovstilan presejon en Miĉigano! Li montris al mi kelkajn fotojn de siaj grandegaj maŝinoj. Ĉe lia presejo Square Text Press li mane presis kuponojn por trinkaĵoj kaj disdonis ilin dum la 44-a Landa Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (kiun oni nun nomas Esperanto-USA) kiam la evento okazis en Detrojto. Kia bela memoraĵo el nia historio! Kontaktu s-ron Driscoll por lerni pli pri lia rara ŝatokupo. Mi gardos la kuponon kiel trezoron enmuzeigindan. Dankon al ambaŭ pro tiuj belaj aldonoj al nia movado.





Presitaj Esperantaĵoj

malnovstilaj…



La portanto de ĉi tiu kupono rajtas ricevi senpage unu senalkoholan trinkaĵon ĉe la vendred-vespera akcepto.

44th Annual Convention
Esperanto League for North America
Fairlane Holiday Inn • Detroit

174 *This coupon entitles the bearer to one free soft drink at the Friday evening reception.*

44a Ĉiujara Kongreso
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Fairlane Holiday Inn • Detrojto

BANKEDO

Sabaton, la 13an de julio, 7:00 ptm.

I printed these tickets when the national Esperanto convention came to the area.
Phillip Driscoll

bankedan bileton presis Phillip DRISCOLL

. . . kaj modernaj



Poŝtkarto farita de Elioto per AI





Ĝulio Feinstein fotis en urba ĝardeno proksima al WPU

Esperantaj Sorĉoj En Angla Sonlibro

de Bradford C. Smith

Third Eye estas fantazia sonlibro verkita de Felicia Day, produktita de Audible, kaj publikigita en ties apo en 2023. Ĝi estas prezentita kiel radio-teatraĵo. La aŭtoro Neil Gaiman servas kiel la rakontisto. Felicia Day rolas kiel la ĉefrolulo Laurel kaj aliaj famaj aktoroj kiel Sean Astin kaj Wil Wheaton ankaŭ rolas.

Laurel Pettigrew estis la Elektitulo, kiu devis savi la mondon el la manoj de la malbonega demono Tybus. Bedaŭrinde ŝi tute malsukcesis. Tybus forŝtelis ĉiom da la magia el la mondo, kaj nun redonas ĝin iom-post-iome nur al tiuj, kiuj konsentas lin servi aŭ pagi aŭ ambaŭ. Li mortigis Laurel, sed revivigis ŝin, por ke li povu plu humiligi ŝin.

Nun Laurel provas travivi per vendado de ŝajn-magiajn rubaĵojn kiuj ŝi vendas el butiko nomita Third Eye. Ŝi vivas en la butiko kun vampiro sen dentegoj kaj feo sen flugiloj, ĝis alvenas knabino kiu neatendite scias ŝian tutan historion kaj ege estimas ŝin.

La rakonto estas tre amuza laŭ la stilo de la romanoj de *Diskworld* aŭ *The Hitchhiker's Guide to the Galaxy*. Neil Gaiman kaj la aktoroj igis ĝin eĉ pli amuza per siaj prezentoj.

Eble plej interese por Esperantistoj estas ke preskaŭ ĉiu sorĉo estas Esperantaj vortoj. Iuj estas fuŝaj kiel "komuniki kun spiritus", sed aliaj estas perfekte bonaj esperantaj subfrazoj. Laŭ Laurel, la lingvo mem ne multe gravas, sed la instruistoj ĉe ŝia magia lernejo ĉiam kuraĝigis la studentoj uzi Esperanton, eble pro ia ŝercemo.

Mi tre bone ĝuis la rakonton, kaj mi kuraĝigus iun ajn aŭskulti ĝin.

La konkerado de kadem bevünetik volapüka

de Samuelo

Kia lingvo mirindaĵplena:
ĉio glata kaj ebena.
Neniam ni restos en konfuzo
pro iu gramatik-kontuzo.

Ricevu liston ni po unu
sagacplenan! Do, oportunu
la lernadon deksesope
por ke ni akiru ĝin galope.

Ĉe la ĉapeloj problemojn staras -
kaj tajpadon ili ofte baras.
Uzu do la H-sistemon
por eviti la stultan emon

literumi *sensenĉave*,
kaj kunmeti ĉion brave
ĉar ni nek ludas nek *diŝakas*
kiel etvorte Scheyler-ano grakas.

Ni procedas nur por precizeco
kaj kontraŭ nekoncizecon
procesas. Ne estu defino provizora
el ruĝa rozo - jen, rozkolora!

Ĉiu litero prononcendas
(nur pro sonoj ni ne harfendas)
ĉar ĉiu restas en sia niĉo
bele kantante per sia piĉo.

La himno eĥas tra la halo
pro la tujvenkota batalo.
Volapukistoj faris nur kaĉon
do ni eĉ ne povas ĝui la matĉon.

Afantazio

de Samuelo

Grize pentras mi bildojn en la menso.
Ankaŭ ili, sed kun pli da bluʼ
Ili spektas filmojn – montras la vidsenso
ĉevalojn, avojn, kaj eĉ dentbroson el arbotruʼ.
Mi memoras la malmolan plastan stangon
ĉe la karuselo, la elstreĉitan livan manon
al la ora ringo, sur ŝvita lipo la langon,
kaj la etknabon, la ununuran festoanon
jam ne ekkaptinta ĝin, la ĝojan naŭzon
de pufmaizo kaj pinka sukervato,
la knaran gurdmuzikon sen ia paŭzo
sunvarmon sur la kruro, surŝultrajn batojn,
kaj la ringon inter fingro kaj polesko,
kaj la saman brilan ĝuon de ĉiu adolesko.

Pri *Iŝtar*: 1999 kaj la sekvo

de Bill Maxey

Nokta mallumo kovris la landon Araban. Estis la horo antaŭ la matena krepusko en la vasta altplataĵo de la nordorienta parto de Arabujo, nomita "Lando Uc". Stela baldakeno, ornamita kvazaŭ per milionoj da tremetantaj diamantoj, etendiĝis super mistere silenta pejzaĝo. Timiga blekado de leonoj kaj hienoj, kiu interrompadis la silenton, jam ĉesis, kaj nun la tuta, virga naturo ŝajne ĝuis la plej profundan ripozon, ĝisla suno vekos ĝin al nova, ĝoja aktiveco.

Tamen ne mankis signo de homa vivo. Sur malgranda altaĵo vidiĝis neforta ardo de estingiĝonta fajro, kiu ĵetis rubenoruĝan lumon sur altkreskan, senmovan figuron de viro, staranta kelke da paŝoj for de ĝi….

Tiel komenciĝas *Pro Iŝtar*, unu el la plej belstilaj romanoj de la tuta Esperanto-literaturo, kiu en 2024 fariĝas centjaraĝa. Tiu altkreska viro nomiĝas Omar, unu el ĝiaj ĉefroluloj. Kun la antikva babilona imperio kiel scenejo, la verko rakontas la luktojn inter la adeptoj de Jehovo kaj la adorantoj de la diino Iŝtar kaj samtempe reliefigas la antipation inter la reĝo kaj la pastraro. La lasta kaj plej bona el la kvar romanoj de Heinrich August Luyken (1864–1947), brita enmigrinto el Germanio, ĝi tre lertege teksas grandan aventuron el tre diversspecaj homoj, amsopiroj, ruzoj, perfidoj, murdoj kaj eĉ sinmortigo per veneno.

Pro Iŝtar eĉ hodiaŭ forte efikas sur min. La relegado de tiu rara, rava priskribo de la nokta ĉielo ĉiam memorigas min pri unu el la plej neforgesablaj spertoj en mia sufiĉe longa vivo. En 1999,

partopreninte en la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en Bogoto, mi flugis al Limo, kaj pasigis tutan monaton vizitante esperantistojn en Peruo, Bolivio kaj Ĉilio. El la ĉilia Puerto Montt mi veturis alterne per boato kaj aŭtobuso tra la Andoj kaj eniris Argentinon proksime de la urbeto Bariloche. Tie mi gastis dum semajno ĉe d-ro Werner Schad, laŭ profesio ĵurnalisto, elmigrinto el Germanio kaj fervora esperantisto. Tiu severmiena sed bonkora homo loĝis proksimume 12km for de la urbeto sur iom izolita duoninsulo ĉe la lago Nahuel Huapi (mapuĉe: “insulo de pumo”).

Unu vesperon, vizitinte la urbeton, mi revenis malfrue per aŭtobuso kaj eliris ĉe la kruda nepavimita vojo kiu kondukis sub altaj arboj al ĉe Schad. En la malhelo preskaŭ totala, mi progresis sufiĉe rapide sed zorgeme laŭ la kurbiĝinta kaj stumbliga pado. Mi koncentris la tutan atenton al la paŝado, por ne misi kaj fali. Post kelka tempo tamen mi haltis por malstreĉiĝi kaj, en iu momento, hazarde en senarbejo, rigardis supren. Tio, kio tie ekfrapis miajn okulojn efikis ravege.

Sur profunde nigra fono brilegis miriadaj steloj, kovrantaj la tutan firmamenton. Kompreneble, mi vidis ĉielon tute nekonatan al nordamerikano, sed ĝi estis tiel dense tegita ke mi dubas ĉu mi povus identigi iun ajn konstelacion. La steloj ja brilegis kiel diamantoj, kun tremantaj radioj kiuj ponarde pikis la spacon. Tiu stelamaso ŝajnis eksterordinare proksime, preskaŭ tuŝdistance. Mi staradis en trankvila silento kaj povis nur gapi kaj sorbi la eksterordinaran belon de tiu momento. Mi certe povus resti tie tre longan tempon, sed pro la striktaj kutimoj de mia gastiganto, mi konsciis ke mi devas rapidi por akurate atingi la vespermanĝon. La sorĉo do rompiĝis, kaj mi daŭrigis la marŝadon.

Infanaĝe, mi loĝis en malgranda vilaĝo, super kiu, nokte, la Lakta Vojo klare vidiĝis, fluante kiel rivero sur la cielo. La astroj vere fascinis min kaj vekis intereson pri astronomio. Efektive, la unua libro kiun mi aĉetis per propra mono estis Our Starland de C. C. Wylie. Eĉ hodiaŭ mi povas vidi ĝian malhelbluan kovrilon kun la

urso kaj la steloj de la konstelacio Granda Ursino. Allogis min ankaŭ la biografio *Maria Mitchell, Girl Astronomer*.

Sepdek jarojn poste, la situacio troviĝas tre malsama. Antaŭ ol translokiĝi en la urbon antaŭ kvin jaroj, mi ofte promenadis ĉirkaŭ la noktomezo, renovigante mian rilaton kun la steloj. La Lakta Vojo ankoraŭ fluas, sed ŝajne diluite. Ankoraŭ fidela, tamen, restas la plej rava el la astroj, la brile blanka planedo Venuso, kiun la homoj en la epoko de Omar nomis Iŝtar. Kompreneble, en multaj lokoj la steloj estas apenaŭ videblaj kaj la spaco super niaj kapoj estas laŭgrade pli kaj pli difektita per satelitoj kaj rubaĵoj. Tiuj ŝanĝoj valorigas eĉ pli mian sperton en tiu nokto en Argentino.

Mi povas do facile ekrilati kun Omar, malgraŭ tio ke ni nepre atribuus al malsamaj fortoj la originon de tiuj "milionoj da tremetantaj diamantoj". Legante tiun ĉi eseeton vi povas facile konstati ke miaj klopodoj vortpentri la "stelan baldakenon" efikas nur banale. Mi do volonte lasos al la talentuloj—krom Luyken, ekzemple, John Francis kaj Jean Ribillard—la poeziecajn priskribojn. Iliaj elvokivaj vortoj tuj revenigas al mia menso tiun mirindan sperton apud la lago kie, laŭ la legendo, magiisto per propra sorĉo foje fariĝas pumo.



Horloĝo ĉe Universitato William Peace
Fotis Brian "Brajeno" HARMON

Baxter Parolas!

de Sandra HABER

Mi tre ĝojas ke mi verkis mallogan rakonton pri mia hundo, kiu nomigas Baxter. En la rakonto, Baxter povas paroli Esperanton. Per sia Esperanto, li planis savi la mondon. Mi amis mian hundon kaj mi amis la rakonton. Mi petis al Raul Garcia traduki ĝin, kaj la libron eldonis Mondial.



La libro nomiĝas *Baxter Speaks! Baxter Parolas!*

La rakonto estis mia kovida brila punkto kaj estas dediĉita al Baxter kiu mortis antau ol la libro estas eldonita.

Oni povas aĉeti de Amazon kaj de UEA.

En la flughaveno estis infano, kiu malaperis. La gepatroj de la infano venkis en la milito kaj enterigis siajn pafiliojn. La hundo de la familio lernis Esperanton kaj trovis la infanon, kiu malaperis en la flughaveno. Ĉiuj pensis, ke la hundo estas mirinda. Ĉiuj amis la hundon, kiu savis la mondon. La homoj decidis, ke la hundo estu la prezidanto de Usono. La venontajn jarojn la hundoj estis rigardataj kiel specialaj kaj kutime iĝis la prezidanto. Ĉiuj homoj estis ĝojaj, ĉar la lando funkciis bone.

La katoj de Usono demandis al la prezidanto-hundo, ĉu kato povas fariĝi prezidanto.

La prezidanto-hundo estis tre saĝa kaj feliĉa, kaj diris “jes” al la katoj. La prezidanto-hundo scias kiel dividi aferojn!

La Bienulino

de Miko Brandini

Ŝia brazila akĉento: konstanta melodio en la ĥaoso de lernejaj tagoj. Ĉarma, sed ofte baro, ŝiaj vortoj foje perdiĝis en miskompreno.

“Ŝi-tiju," ŝi diras, montrante al ĵuspresitaj dokumentoj, kaj mi kapjesis, komprenante ŝian signifon.

Estis mia dua jaro, kaj ŝia kvara. Ni fariĝis partneroj antaŭ jaro en la mezlerneja frenezo, ĉiutage luktante por regi la freŝe adoleskantan ĥaoson.

Ŝi sciis pri kutimaj proceduroj, la paŝoj, kiujn ĉiu instruisto devis fari, sed ĉu fakte ankaŭ kiel pacigi la ĉambrajn ŝtormojn laŭbezone? Tiu esenca farendaĵo ofte eskapis al ni ambaŭ.

Tamen kelkfoje ni perfekte kompletigis unu la alian. Ŝi subtenis min, kaj mi subtenis ŝin, niaj kombinitaj klopodoj kreantaj pormomentan ordon aŭ sufiĉe glatan similan staton. Alifoje ni provis eskapi, kaŝante nin, lasante la klasĉambron plue disfali.

Tiu modelo de subteno kaj evito, niaj komunaj luktoj, markis nian partnerecon.

Nun, en la trankvilo post la ŝtormo, la pikiloj ankoraŭ freŝaj, mi repripensas nian tempon kune. Estas tristeco kaj kulpo, sed ankaŭ kulpigo kaj kolero. Ĉi tiu profesia rilato kostis al mi multe.

Tamen, mankos al mi la Sinjorino. Ŝia graco, ŝia rideto, ŝia ĉeesto miksitaj kun ŝiaj difektoj, ĉio parto de la turbulenta vojaĝo kiun ni kunspertis. Dum mi sidas serĉante manieron por travivi, mi portas la pezon de niaj spertoj, la dolĉ-amaran memoron de partnero kiu samtempe levis min kaj tiris min malsupren.

Ni ne havos alian jaron kune, malkiel ni antaŭatendis. Eĉ en tiu lasta tago, ni ne antaŭvidis la finon. Eble iam vi revenos al via kara brazila bieno. Ne rezignu.

Pri Lingvodenaskuleco

de Anthony BURGER

Mi naskiĝis en Usono, sed infane mi plejparte parolis la ĉeĥan. Miaj gepatroj parolis ĝin, mia avino parolis ĝin dum siaj kelkmonatlongaj vizitoj, kaj mi vere havis malmultajn kialojn por uzi la anglan hejme (krom la vizitoj de miaj usonaj geavoj — miaj gepatroj decidis loĝi en Usono pro la proksimeco al ili).

Kiam mi lernejaĝiĝis, mi tamen aliĝis mondon, en kiu oni parolu nur la anglan kun instruistoj, amikoj kaj iu ajn, kiun ri renkontas. Mi komencis paroli la anglan kun mia fratino kaj respondi al miaj gepatroj en la angla.

Miaj gepatroj, je tiu tempo, memorigadis nin: se vi ne parolos la ĉeĥan, vi ĝin forgesos. Sed mi neniam kredis ilin. Kiel oni povus perdi sian denaskan lingvon? Estus kiel perdi la manojn — ili ja ne malaperos pro maluzado. Tion mi pensis.

Sed fakte denaska lingvo similas dentojn. Se oni ne brosas ilin, oni komencas perdi ilin. Mi iom post iom forgesetadis gramatikon kaj vortojn — ne komplete, sed maltrankviliĝante. Ĉiu sentas la efikojn de mankanta lingvouzado (angle "language attrition") — oni komencas fojfoje forgesi vortojn, parolas malpli flue kaj devas serĉi la cerbon por la ĝustaj frazoj. La efikoj estas tamen plej grandaj en la infanecoj. Tiam oni povus eĉ tute forgesi sian denaskan lingvon.

Tial mi demandas: Ĉu tiaj homoj estas denaskulaj parolantaj de la lingvoj, kiujn ili unue lernis?

Anglalingve, tiaj lingvoparolantoj ofte nomiĝas "heritage speakers," kontraste kun "native speakers." Sed kion signifas "denaskulo", la esperanta vorto?

Laŭ la Plena Ilustrita Vortaro:

> denaska
> 1 Ekzistanta jam ĉe la naskiĝo: *denaska blindeco, misformiĝo, instinkto*.
> ☞ *hereda*. SIN. denaskiĝa.
> 2 Tia de sia naskiĝo: *denaska parolanto de lingvo, denaska esperantisto*

Laŭdifine, homoj kiel mi ja estas denaskuloj. Eble mi ne parolas perfekte, sed la ĉeĥa estas lingvo de mia naskiĝo, kaj mi neniam ĉesis paroli ĝin.



Griza Eminenco

de Birke DOCKHORN

Unu el la novaj konceptoj en mia ĉi-jara kurso estis “Griza Eminenco” – kaj ĝi vekis surprize grandan intereson inter la lernantoj. Kio ĝi estas kaj de kie venas la nocio?

Temas pri persono, kiu konsilas en la fono kaj de tie grave influas la agojn de pli konata homo. Ekzemple politikistoj havas ofte personojn malantau si, kiuj grave influas iliajn decidojn. Sed kiun la publiko vidas, estas nur la politikistoj en la malfono.

Mia unua penso pri la grizeco estis “nevideblo” au “ombro”. Tio estas pravigebla. Temas ja fakte pri iu “reĝo en la fono”. Sed esploroj pere de la partoprenantoj montris, ke la fonto de la esprimo estis la kapucena monaĥo Père Joseph (François-Joseph Leclerc du Tremblay, 1577 – 1638). Li karieris ene de kapucena ordeno kaj akiris influon al la franca politiko. Fine li fariĝis konsilisto de la kardinalo Richelieu. Bildoj montras lin en griza vestaĵo kun kapuĉo. Eble la grizeco de la esprimo venas de tio?

Ĉiel ajn, ni en la kurso intertempe tiom bildigis, ripetis, reskribis kaj pridiskutis tiun esprimon, ke ĝi fariĝis unu el la plej prilaboritaj novaj nocioj. Tial ĝi eniris nian cerbon sufiĉe profunde kaj bele ilustras la kernan temon de la supera kurso. Kaj efektive ankau mi lernis ion novan. Ĝojige!

Kaj cetere jen temo por plia pripensado: Ĉu ekzistas esprimo por la malo? Kiam iu staras en la malfono, sed estas senpotenca?

ABC-listo de NASK 2024

de Bill Maxey

A	Amtrak, anasoj, Akselo, Alenja
B	Buŝo, Brandono, Brusto, Brovo, Brajeno
C	cerbo
Ĉ	ĉeloj
D	demenco
E	Enriko, Elioto
F	fulmotondro, fromaĝo, froti, flari, fragoj, fungoj
G	grati, gestoj
Ĝ	gufujo, Ĝulia
H	Hanso
Ĥ	ĥirurgio
I	instruado
J	juki
Ĵ	ĵetado
K	kandeloj, kapjesi, Koro, Kruro, Kajto, Kuo, Keri, Kalkano
L	ligno, Lutero
M	"Mi memoras", Manradiko, mankremo, Mamuto, moviĝo
N	Nuko
O	oscedi
P	pilkoludoj, papero, plumo, "La Princino", proverboj, Phillip
R	rukti, Renoj, ripetado, Rafa
S	seĝo, skribilo, singulti, Sino, Suro, Sandy, salikokoj
Ŝ	ŝnuro, ŝampuo, ŝviti, ŝercemo, [Ŝila mankas.]
T	tusi, Tibio, Traĥeo
U	Ukraino
V	vomi, Vejnoj
Z	[Zerbie (kaj Ken) mankas.]



Hanso, Rafa, Karleto, Brandono, Bill, Sergeo, Elioto
Birke, Vinĉjo, Miko, Brajeno, Nikolao, Kristinjo, Tomaso, Samuelo
Kejti, Tony, Mamuto, Enriko
Alekso, Phillip, Lutero, Brandono, Ĝulio, Alejna, Raja, Keri, Sandy
fotis Alekso MILLER

Redaktis la *NASKan Faskon* kaj petis ilustraĵojn de ChatGPT
Brajeno Harmon

